FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

LA HOUSSAYE EN BRIE
F - 77610-FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006-PARIS
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170-LE PARREUX sur MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT rue des Oiseaux 27700-LES ANDELYS

C.C.P. Association Cath. Franç. pour l' Esperanto ROUEN 2324 93 N.

=== le nº: 2 F; abono: 7 F; kotizo: 1 F; sume: 8 F. ===

::::::

Nia asocio sendis salutleteron al la tritaga simpozio organizita de S-to Paruzel en Pollando; en ĝi partoprenis S-toj Degrelle kaj Goudé.

Ĉiun trian monaton, nia bulteno informas la anojn de la Franca Katolika Esperanto Asocio. Bedaŭrinde, ni ne havas multajn novaĵojn pri la loka vivo de niaj disaj anoj kaj grupoj, kiuj laboras en diversaj francaj regionoj. Ni ŝatus ricevi aprobojn, kritikojn, proponojn, cele al pli vivanta agado en la katolikaj medioj.

Per partopreno en niaj medioj de diversaj neŭtralaj aŭ fakaj organizaĵoj, ni povas utile propagandi ne nur por nia agado, sed ankaŭ - tio estas nepra vidpunkto - por la praktiko de la uzo de Esperanto.

En niaj katolikaj medioj, ni devas ankaŭ konigi Esperanton, gvidi kursojn aŭ konigi la ekzistantajn kaj montri la utilecon de la lingvo internacia praktikante rilatojn kun samideanoj aŭ samideanaj grupoj el diversaj landoj. Tio povas esti celo de niaj rondoj/ : krei ligilojn inter personoj, kiel katolikoj koj, kaj tie atesti la veran universalecon kaj fratecon, malgraŭ la landaj kaj politikaj limoj.

Nun, mi devas ĉi tie rediri la inviton de IKUE al la jubilea kongreso en Romo. Kun granda ĝojo, la partoprenontoj povos senti kiel reala estas la ŝafaro de Jesuo-Kristo en sia unueco kiel en sia diverseco. Nia komuna lingvo ebligos al la partoprenontoj pli frate kaj amike kune vivadi en tiu semajno.

En la komuniko de aprilo, ni eksciis, ke jam 237 aliĝoj el 13 landoj estis kalkulitaj. Nia devo estas, se eble, partopreni multnombre; jam kelkaj Francoj sendis aliĝilon, tio estos por ili kaj nia movado stimuliga kaj pliriĉiga.

Mi petas ĉiujn, kiuj povas atingi gazetojn aŭ legas artikolojn pritraktantaj diversajn internaciajn aferojn, skribi leterojn aŭ verki projektajn artikolojn por interesigi la gazetaron al nia afero.

Fine, en via nomo, kaj en la nomo de la konsilio, mi esprimas mian dankemon al ĉiuj, kiuj, per diversaj klopodoj, fervore agas por vivigi nian asocion kaj mi petas de ĉiuj subtenon kaj agantan helpon.

R. Cl. COLAS.

==========

ANONCOJ

1) Por ekspozicio pri Esperanto ĉe la Vroclava Porpastra Seminario kaj por organizata Ekumena Esperanto-biblioteko, sendu donace ĉiajn esperantaĵojn kaj diapozitivojn pri sakrala arto al: S-to Ladislao Kloc, pl. Grunwaldzki 3, PL 50-377 WROCLAW POLLANDO.

2) A vos amis intéressés par le problème des langues, mais qui ne peuvent suivre un cours public, nous conseillons vivement la cours par correspondance "Steleto." Rédigé par des professeurs de langues, il se compose de 16 livrets illustrés. A l' inscription, l' élève reçoit les 2 premiers; les autres lui sont envoyés au fur et à mesure suivant le rythme de son travail. Prix: 60 F à envoyer à Union Française pour l' Esperanto 4 bis, rue de la Cerisaie 75004-Paris c.c.p. Paris 855 35.

3) Por ebligi la eldonadon de nova informilo, nia asocio malfermas specialan fonduson. La monon akceptos mia p.ĉ.k. Rouen 2324 93 N.

4) Ni petas la lokajn grupojn kaj izolulojn regule sendi al la redakcio raportojn pri sia loka agado.

++

NEKROLOGO

Ni tre bedaŭras la forpason de nia kara longjara anino F-ino Marcelle CLAUDE el Paris. Ŝi estis tre sindona kaj ofte helpis la konstantan sekretarinon en ŝia laboro por UFE. Ŝi mortis kelkajn tagojn antaŭ nia kongreso en Lille pro kruela malsano.

Ni preĝu por la ripozo de ŝia animo.

§§§

EVANGELIO

La evangelia mesaĝo prezentas apartan aktualecon. Sen amo inter la homoj, al kiu ĝi tiel forte kaj ĝenerale invitas nin, sen la sindonemo, kiu povas puŝi nin transe de la prudenteco, nia mondo, eĉ bonege organizita, eĉ transformita en perfektan maŝinon, kiu juste distribuus la bonaĵojn, tiu mondo pli kaj pli fariĝus grandega instanco de grega produkto, de grega pensmaniero; ĝi fariĝus perfekta monstro disvastiganta afekte mildan odoron de sterilizanta antisepsaĵo.

(El L. Leprince-Ringuet, Science et Bonheur des hommes)

LES TEMOINS DE JEHOVAH ET LA FOI CHRETIENNE

Une brochure illustrée en couleurs, de 28 pages, due à l' abbé Le Cabellec (33, cours de Chazelles 56100-Lorient) peut permettre d' éclairer les fidèles décontenancés par la propagande active des témoins de Jéhovah.
Commandes à adresser avec leur montant à l' abbé Le Cabellec.
c.c.p. Nantes 3075 70 Z. Franco: 1 ex. 3 F.

wwww

JARKUNVENO DE FKEA

En Lille la 18-an de majo 1975; ĉeestis 20 anoj; 17 sendis rajtigilon.

S-to Bourdon malfermas la kunvenon per salutvortoj kaj transdonas la parolvicon al la prezidanto S-ro Colas. Tiu ĉi prezentas la salutvortojn de S-to Degrelle, F-ino Le Boëdec, F-ino Vanneau, S-ino Michau, S-roj Barrier, Bessière kaj Royer. Venis salutoj el Aŭstrujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo kaj el la prezidanto de UEA, D-ro Tonkin.

Artikoloj pri la kongreso aperis en Journal de la Paix, Nord-Eclair, La Voix du Nord.

Post legado de la agadraporto (p. 1 de la bulteno), S-ro Colas sciigas pri la morto de F-ino Claude el Paris. FKEA sendis bondeziran telegramon al la germana Esperanto-kongreso en Oberkirch.

S-ro Thiollière sendis artikolojn al diversaj gazetoj.

S-ino Vincent prezentas la financan raporton:

ENSPEZOJ			ELSPEZOJ	
Kotizoj	1 138,00	*	Bulteno	660,01
Donacoj	133,05	*	Aliaj presaĵoj	688,80
Profito kongreso	19,50	*	Korespondado	59,40
Rentumo ŝparkaso	127,77	*	Vojaĝelspezoj	629,60
Saldo 1/1/74	2 977,40	*		
	4 395,72	*		2 037,81

Profita saldo la 31/12/74 2 357,91 F

S-ro Despiney demandas S-inon Vincent, kial ŝi ne prezentas buĝetproponon. Ŝi respondas: pro la nuna inflacia situacio.

L. Bourgois proponas perkorespondan kurson.

La agadraporto estas unuanime akceptita; pri la financa estas unu sindeteno (la kasistino).

Renovigo de 1/3 de la konsilio: finis sian mandaton: S-roj Bessière, Colas, Despiney, S-to Bourdon. Ili rekandidatiĝas kaj estas elektitaj per 31 voĉoj.

Franca Katolika Esperantisto: S-ino Vincent invitas la lokajn grupojn sendi informojn pri sia agado. S-ro Bourgois rimarkigas tajperarojn en la lingva angulo. S-ino Vincent proponas prizorgi la stencilojn. L. Giloteaux rimarkigas, ke la lingva angulo de nia bulteno instigis anojn, eĉ ne katolikajn, ĝin aboni.

Vizitis nin la superulo de la monaĥejo.

S-to Baudry sciigas, ke la rektoro de la Katolika Fakultato en Lille favoras nian agadon.

Ĉeestas S-ro Crombez, magistratano en Roubaix. Li rimarkigas, ke estas bone influi la politikajn mediojn, ĉefe en Eŭropo, por enkonduki Esperanton en la lernejojn.

S-ro Colas petas la vidpunkton de la legantoj pri la ceteraj rubrikoj de nia bulteno. Ĉiuj aprobas la franclingvan bileton de la prezidanto.

Ĉiun trian monaton, la konsilio publikigas sian protokolon. Ĉiu povas sendi sugestojn. Materialo por la distra paĝo estas bezonata. Korespondpetoj estas bonvenaj.

Ni dankas S-ton Ouarnier, kiu, kunlabore kun S-ino Vincent, tute senpage prizorgas la belaspektajn ilustritajn paĝojn.

La kotiztabelo nepre aperu en ĉiu numero.

S-ro Colas rimarkas, ke mankas recenzoj de libroj. S-ro Delcourt konsentas prizorgi tiun novan rubrikon.

S-ino Vincent proponas aperigi aliĝilon en ĉiu numero. Aprobite.

Kongreso 1976: S-to Baudry proponas okazigi ĝin kelkfoje kadre de la nacia kongreso. Por la venonta jaro, oni proponas Grésillon aŭ Bourges.

Oni propon[illegible] en UK, IKUE okazigu ĝeneralan kunvenon en la kongresejo mem.

Kongreso en Romo: 14 francoj aliĝis. Eblas alveni antaŭ kaj resti iom [illegible] la kongreso. Oni sendos cirkuleron al la aliĝintoj.

.../...

Diversaj proponoj: L. Bourgois: malfermo de propaganda fonduso. S-ro Colas: konkurso por la plej bona franclingva propagandilo. S-ro Despiney: Ĉu ekzistas grupoj inter niaj anoj? Ĝis nun ne. Ni instigu la unuopajn anojn kuniĝi en rondetoj por kunlabori. S-ro Colas aldonas, ke tiel estas pli facile klopodi ĉe la lokaj neesperantistaj organizaĵoj.

Dum la komitata kunveno, kiu okazis tuj poste, la antaŭa estraro estis unuanime reelektita.

xxxx

reĝo Filipo Aŭgusto al kiu ki estis promesinta ne fortigi Les Andelys. Tiel provokita, Filipo Aŭgusto baldaŭ reagos.

Antaŭ la konstruado, militpaŭzo estis konsentita inter la angla kaj franca reĝoj por ebligi al ili partoprenon en la tria krucmilito (1189-1192). Filipo Aŭgusto revenis Francujon antaŭ ol atingi Jerusalemon kaj profitis la foreston de Rikardo por kapti Normandion. Survoje al reveno, Rikardo estis kaptita de la aŭstra duko kaj estis liberigita dank' al granda monsumo donacita de sia patrino Aljenor de Akvitanio.

Li reprenis Normandion kaj subskribis kun Filipo Aŭgusto la kontraktom de Louviers, kiu fiksis la limon en Muids, 10 km okcidente de Les Andelys (1196).

Post multaj restadoj en sia kastelo, Rikardo mortis en 1199. Lia frato Johano Sen Tero kaptis la anglan tronon kaj murdis sian nevon Arturon, heredonton de Rikardo. Filipo Aŭgusto kulpigis lin pri perfido kaj konfiskis liajn feodojn.

En 1203, la franca reĝo atakis Kastelon Gajar' kaj prenis ĝin post sepmonata sieĝo.

Dum la centjara milito, la Angloj atakis la fortreson en 1418. La defendantoj cedis nur post 16-monata sieĝo.

Nur en 1449, la franca reĝo Karlo VII-a prenis ĝin post dumonata sieĝo kaj ĝi definitive iĝis franca.

Henriko IV-a ordonis ĝian malkonstruon en 1591.

xxxx

XXXXXXXXXXXXXXXX

BULTENO KOMPLETIGOTA KAJ RESENDOTA AL
Association Catholique Française pour l' Esperanto rue des Oiseaux
27700-LES ANDELYS Tel. 474 p.ĉ.k. ROUEN 2324 93 N

Mi deziras aliĝi al Franca Katolika Esperanto Asocio kiel ordinara/bonfara/dumviva membro (1) kaj kunsendas ..... F per mandato/bankĉeko/poŝtĉeko (1)

Nomo kaj voknomo:

Adreso:

Profesio:

Naskiĝdato (nur por statistiko):

Dato kaj subskribo:

(1) Forstreku la senutilaĵojn.

==========

COURS PAR CORRESPONDANCE

Je soussigné (nom et prénom)

Profession:

Date et lieu de naissance:

Adresse complète:

souscris au cours d' Esperanto par correspondance organisé par l' Union Française pour l' Esperanto et verse à son ccp Paris 855 35 la somme de 60 F.

Date et signature:

==========

GRAVAJ INFORMOJ.

1) Letero el Pollando: "Nia ĉiumonata Diservo en Esperanto bone sukcesas. De ĉiuj flankoj ni ricevas salutojn, gratulojn kaj bondezirojn. Mi memorigas: niaj kunvenoj okazas ĉiun duan dimanĉon de la monato je la 16-a. Volonte mi aŭskultos viajn dezirojn kaj proponojn rilate al niaj kunvenoj, por ke nia ĉeestado estu gaja kaj fruktoplena por nia Esperanto-movado. Elkore ni invitas vin kaj viajn konatojn partoprenni la kunvenojn. Kun kristanaj kaj esperantaj salutoj, via en Kristo nia Savinto. S-to Leszek Irek.

2) Al la glumarkkolektantoj: sendu specimenojn aŭ informojn pri la noveldonitaj glumarkoj (okazo, urbo, lando, dato, formato, koloroj, konturoj, kvanto en ĉiu folio, eldonkvanto...) al S-ro Gaston TREMON, 31, rue Turgot 87350-PANAZOL, por ke li povu katalogi ilin.

++

POR NIA SLIPARO

Se vi ankoraŭ ne faris, bonvolu sendi TUJ al la redakcio la jenajn informojn:

Nomo kaj voknomo:
Naskiĝdato:
Profesio:
Adreso:
Ĉu vi gvidas Esperanto-kurson? JES NE En kiu instituto?
Kiam?
Nombro kaj aĝo de la gelernantoj:
S-ino J. Vincent rue des Oiseaux 27700-LES ANDELYS

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

KOTIZTABELO 1975

IKUE kun "Espero Katolika" . . . . . 27 F
IKI kun "Vojo, Vero, Vivo" . . . . . 5 F

Peranto: G. Véron c.c.p. ROUEN 1188 63 Z.

-:-:-:-:-:-

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" . . . . . 8 F
(infanoj malpli ol 16-jaraj, sacerdotoj, religiul(in)oj . . . . 4 F
Membro bonfaranto . . . . . 40 F
Dumviva membro . . . . . 160 F

- - - - - - - -

UFE kun "Revue Française" . . . . . 60 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro . . . . . 88 F

Assoc. cath. franç. pour l' Espº c. c.p. ROUEN 2324 93 N.

Abono al "Biblia Revuo" . . . . . 28 F

Peranto: G. Baudry c.c.p. LILLE 4704 43.

wwww